De mia sperto, akirita dum longa vojaĝo tra ĉiuj landoj de la Nova Mondo, mi vidis grandan estontecon por nia movado en tiu ĉi kontinento. Tie ĉi nia movado povos kreski rapidege, se la Amerikaj Esperantistoj havos pli taŭgajn organizojn, pli fortan unuecon, pli sinceran kunlaboradon, kaj faros pli sindoneman klopodadon, pli viglan agadon, pli diskretan propagandon. Ĉar Esperanto estas treege facila por Latino-Amerikanoj, kiuj povas lerni ĝin en mallonga tempo. Samtempe Esperanto estas tre bezonata instrumento por Nord-Amerikanoj en iliaj ĉiutage kreskantaj rilatoj kun aliaj popoloj. Krome, la publika opinio ne estas kontraŭ la internacia lingvo, sed ĉie oni sentas la neceson de la universala helplingvo. Laboru, do, karaj samideanoj, laboru pli vigle, pli fervore por disvastigi nian lingvon! Enirigu ĝin ĉiufranken kaj ĉiuloken! Precipe enirigu ĝin en la lernejojn! Nur tiel ĝi povos triumfi.

Post hejmenreiro, mi faros mian eblon, laŭ mia modesta povo, por diskonigi Esperanton inter miaj samnacioj, kaj samtempe mi kunlaboros kun vi internacie. Kaj mi skribos al vi el Ĉinujo de tempo al tempo.

Fine, kun kora saluto kaj sincera danko, mi bondeziras al vi ĉiuj, ĝojon, feliĉon, prosperon kaj plenan sukceson en via esperanto-laboro!

Via ĉina amiko,

*Pastro Johano Baptisto Kao*

Nov-Jorko, la 14-an de Februaro, 1946.

---

## HEROLDO DE ESPERANTO

Responde al multaj demandoj, S-ro Teo Jung (Nederlando) petas nin komuniki ke jam de ok monatoj li estas klopodanta pri reeldono de Heroldo de Esperanto, kiu estis antaŭ la milito la semajna internacia organo de la Esperanto-movado. Fine li sukcesis aranĝi ke la unua postmilita numero povos aperi, post nelonge, kun 8 grandaj paĝoj, en la tradicia taggazeta formato. En la jaroj 1920-1940 aperis entute 1049 numeroj de Heroldo, nombro ne atingita de iu alia Esperanto-gazeto. La 1050-a numero ĵus estis kompostita kiam la invado de la Hitler-armeoj en Nederlondon kaj Belgujon malebligis ĝian aperon.

La abonprezo de Heroldo por 1946 estas por Usono du dolaroj. Laŭ interkonsento kun la ĉefoficejo de IEL, usonanoj povas pagi sian kotizon por Heroldo al la Ĉefdelegito de IEL, Donald E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37, California.



# ĈINA AMBASADORO DE ESPERANTO EN SUDA KAJ CENTRA AMERIKO

Kiam Pastro Kao foriris de Buenos Aires al Paragvajo, unu el la argentinaj Esperantistoj, kiuj adiaŭis lin je la stacidomo, ŝovis vizitkarton en lian manon. La eminenta ĉina "Ambasadoro de Bonvolo" legis ĝin nur poste, en la vagonaro rulanta laŭlonge de la Parana Rivero. Ĝi diris: "Pastro Kao, dum via restado en Buenos Aires vi faris pli multe por Esperanto ol ni ĉiuj kune faris dum 30 jaroj."

Tiu vizitkarto estis inter la interesaj dokumentoj, kiujn Pastro Kao montris en New York la 19an de Januaro, kiam li raportis en la Esperanto-Interlingva Asocio pri sia 14-monata vojaĝo tra ĉiuj landoj de Suda kaj Centra Ameriko kaj pri siaj klopodoj por la disvastigo de Esperanto en tiuj landoj. Estante modesta homo, Pastro Kao diris, ke la vortoj sur la vizitkarto estas troigo, sed ke li tre ege ĝojas, ke, laŭ la juĝo de multaj Esperantistoj, lia vojaĝo havis kuraĝigan kaj instigan efikon por la Esperanto-movado.

Pastro D-ro Johano Se-Tsien Kao, O.F.M., Delegito de la Apostola Vikario de Fengsiang, en la Provinco Shensi en Ĉinujo, faris la longan vojaĝon, preskaŭ ĉiam aerplane, kiel Membro de la Ĉina Helpa Komitato por Militviktimoj, agentejo de la Ĉina Registaro. Li vizitis la Prezidantojn de 8 respublikoj, la Ministrojn pri Eksterlandaj Aferoj de 11 landoj, la Nunciojn kaj Apostolajn Delegitojn de la Papo en ĉiuj landoj, kaj pli ol 40 katolikajn ĉefepiskopojn kaj episkopojn. Pastro Kao faris pli ol 280 publikajn prelegojn, multajn el ili en universitatoj, kaj 78 radio-paroladojn. Li donis intervjuojn al pli ol 120 ĵurnaloj. 27 el liaj paroladoj estis en aŭ pri Esperanto, sed Esperanto estis menciata aŭ detale priskribata en preskaŭ ĉiuj paroladoj. Plej ofte Pastro Kao paroladis en hispana kaj

portugala lingvoj, multaj prelegoj estis en Esperanto, kelkaj en angla, franca, kaj ĉina lingvoj.

Statistiko estas seka. Sed la raporto de Pastro Kao en New York tute ne estis seka. Li montris dikan libron, kiu enhavas eltranĉaĵojn el la ĵurnaloj de ĉiuj landoj de Suda kaj Centra Ameriko, en kiuj aperis intervjuoj kun Pastro Kao, biografiaj informoj pri li, aŭ raportoj pri liaj paroladoj kaj vizitoj. Preskaŭ ĉiuj el tiuj artikoloj enhavas almenaŭ mencion pri Esperanto, multaj entenas kompletan propagand-artikolon por nia lingvo. Pastro Kao montris tion ekzemple pri "O Globo," de Rio de Janeiro, kaj "Agora," de Buenos Aires.

Estante katolika pastro, la ĉina eminentulo ankaŭ faris predikojn en Esperanto, ekzemple dum la Argentina Esperanto-Kongreso en Rosario kaj diversfoje en Buenos Aires, en diservoj organizitaj de la Argentina Katolika Esperanto-Asocio, kiu havas preskaŭ 200 membrojn kaj kies agadon Pastro Kao multe laŭdis. Li ankaŭ montris honoran medalon, kiun li ricevis de tiu Asocio.

Dum li estis en Buenos Aires, tri libroj de Pastro Kao aperis en tiu urbo. Unu estas Sistema Vortaro en Hispana Lingvo kaj Esperanto, kiun li preparis antaŭ sia vojaĝo. La plej grava verko estas "Ĉinujo Hodiaŭ kaj Morgaŭ," hispanlingva diskuto de la plej gravaj nuntempaj problemoj kaj tendencoj en Ĉinujo. Bonega ĉapitro pri Esperanto, kiun ĝi entenas, ne nur prezentas, en klara kaj konvinka maniero, la problemon de internacia lingvo kaj ĝian solvon per Esperanto, sed ankaŭ pravas la nuntempan utilecon de Esperanto per la ekzemplo de la personaj spertoj de la aŭtoro en multaj landoj de Azio, Eŭropo kaj Ameriko. La ĉapitro estas la teksto de parolado, kiun Pastro Kao faris la

16-an de Junio 1945 en la Ĵurnalista Societo (Circulo de la Prensa) en Buenos Aires. La tria libro estas hispana traduko de la verko pri la Socia kaj Politika Filozofio de la Konfucianismo, kiun li originale publikigis franclingve en Paris en 1938.

"*Amerika Esperantisto*" jam raportis, kiel Pastro Kao, kiu estas unu el niaj Korespondantaj Redaktistoj, helpis la sukceson de la Tria Argentina Esperanto-Kongreso en Rosario. Lia vojaĝplano ne permesis al li, esti en Rio de Janeiro dum la Deko Brazila Esperanto-Kongreso, sed en la antaŭaj monatoj li faris tiom da reklamo por Esperanto en Brazilo kaj tiom helpis sukcesigi la Kongreson, ke la Ĝenerala Sekretario de la Kongreso, S-ro Ismael Gomes Braga, sendis al li oficialan dankleteron.

En Sudameriko la Esperanto-movado estas plej vigla en Brazilo, Argentino kaj Urugvajo, kaj Pastro Kao multe laŭdis la agadon de la tieaj samideanoj kaj organizoj. En la aliaj landoj ankaŭ ekzistas Esperantistoj, sed ili ne estas tre aktivaj. En Ĉilo, Ekvadoro, Peruo, Nikaragvo, Honduraso, ktp. Pastro Kao paroladis pri Esperanto en la radio, tiamaniere kreante novan intereson. En Peruo li ne vidis eĉ unu Esperantiston, sed parolinte pri Esperanto en radio, li ricevis el malgranda urbo leteron kun la informo, ke ekzistas kelkaj Esperantistoj en tiu loko. Bedaŭrinde li ne povis akcepti ilian inviton kaj viziti ilin. Pastro Kao ankaŭ renkontis aron da Esperantistoj en Meksiko.

Donante vigan priskribon de la movado kaj de ĝiaj gvidantoj en Sudameriko, Pastro Kao laŭdis speciale la energian kaj sindoneman agadon de S-ro Couto Fernandes, D-ro Do-

mingues kaj S-ro Gomes Braga en Brazilo kaj de D-ro Quina Gonzalez en Argentino. Li aldonis, ke bedaŭrinde en kelkaj lokoj nesufiĉa kunlaboro, internaj disputoj kaj neaŭgaj propagand-metodoj malrapidigas la progreson. En kelkaj okazoj gravaj personoj treege miris, kiam Pastro Kao parolis al ili pri Esperanto. Ili havis la eraran impreson, ke Esperanto estas spiritista afero aŭ ke ĝi estas ligita kun komunismo aŭ anarkiismo. Pastro Kao diris, ke ĉiu havas la rajton uzi Esperanton por siaj propraj celoj, sed ke en la ĝenerala propagando oni devas ĉiam insisti, ke Esperanto apartenas al ĉiuj kaj ke la neŭtrala Esperanto-movado estas neniel ligata kun politikaj, religiaj aŭ klasaj interesoj.

En diversaj landoj Esperantistoj parolis al Pastro Kao kun laŭdo kaj admiro pri "*Amerika Esperantisto*," kiun ili konsideras tre bona kaj taŭga gazeto. Laŭ la opinio de Pastro Kao, regula kaj intima kunlaboro inter la Esperantistoj de Norda, Centra kaj Suda Ameriko estus dezirinda. Tia kunlaboro sendube havus tre favoran influon al la progreso de Esperanto en la okcidenta duonsfero kaj en la tuta mondo.

Pastro Kao, kiu foriris el sia hejmlando en 1930, por studi en Romo kaj Francujo, partoprenis internaciajn kaj naciajn Esperanto-kongresojn kaj vizitis Esperantistojn kaj Esperantogrupejojn en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. Li intencas reiri al Ĉinujo en la proksima estonteco. Homo eminenta, klera, elokventa kaj simpatia, li faris multe por Esperanto ankaŭ en Usono. Ni deziras al li feliĉan vojaĝon kaj grandan sukceson por lia estonta Esperanto-laboro en Ĉinujo.

---

*Ĉiu Membro de EANA aŭtomate fariĝas Asocio-Membro de IEL. Sed por ricevi la Jarlibron kaj gazeton de IEL oni devas aparte fariĝi Individua Membro de IEL Ĉef-Delegito: D. E. Parrish, 328 W. 46 St., Los Angeles, Cal.*

# LA JARCENTO DE LA ORDINARA HOMO

HENRY A. WALLACE

*Sekretario de Komercio por Usono*

*Redaktista Noto:* Ĉi tiu estas la lasta el tri sinsekvaj partoj de la epoka parolado de Henry A. Wallace. La tezo estas ankoraŭ tre grava — ja eĉ pli grava nun post la eksplodo de la atoma bombo.

★

(*Daŭrigo*)

Kaj kiam la tempo de paco venas, la civitano denove havos devon, la superregan devon por oferi la malpli-grandan intereson al la pli granda intereso de la ĝenerala bonstato. Tiuj, kiuj formulos la pacon, devas pensi pri la tuta mondo. Ne povos esti privilegiitaj popoloj. Ni mem en Usono ne pli estas mastro-raso ol la Nazi-anoj. Kaj ni ne povas daŭrigi ekonomian militadon sen planti la semojn de armita militado. Ni devas uzi nian potencon ĉe la pac-tablo por konstrui ekonomian pacon kiu estos justa, bonfarema kaj daŭra.

Returne al la kvar devoj: Produktadon, jes — estos facile havigi produktadon sen aŭ strikoj aŭ sabotado, produktadon kun tuktora kunlaboro per volontaj brakoj kaj viglaj cerboj; entuziasmo, aktiveco, energio konektitaj al la mova forto de senĉesa persistado tagon post tago. Hitler scias, tiel bone kiel tiuj el ni, kiuj sidas en la kunsidoj de la Konsilantaro por Milita Produktado (War Production Board), ke ni ĉi tie en Usono estas gajnantaj la batalon por produktado. Li scias ke kaj la laboro kaj la komercio en Usono estas farantaj plej rimarkindan taskon, kaj ke lia sola espero estas trarompĵi al plena venko iam dum la sekvontaj ses monatoj de nun.

Mi ne necesas diri multon pri la devo por batali. Iuj asertas, kaj Hitler kredas, ke la usona popolo fariĝis mola en la lasta generacio. Agentoj de Hitler konstante predikas en Sud-Ameriko ke ni estas tĵimuloj, kiuj ne povas tiel uzi la batalilojn de mo-

derna milito kiel la "bravaj" germanaj soldatoj. Estas vere ke usonaj junuloj malamas militadon kun sankta malamo. Sed pro tiu fakto, kaj pro tiu ke Hitler kaj la germana popolo reprezentas la veran simbolon de milito, ni batalos kun senlaca entuziasmo ĝis militado kaj la ebleco de militado estas forigitaj for de tiu ĉi planedo. Ni purigos la plago-lokon de Eŭropo, kiu estas la Germanujo de Hitler, kaj kune kun ĝi la infero-kavon de Azio — Japanujo.

La usona popolo ĉiam havis fortan kuraĝon kaj ĉiam ĝin havos. Vi konas la rakonton pri Bombard-Piloto Dixon kaj Radiofonisto Gene Aldrich kaj Armilisto Tony Pastula — la rakonton kiun Usonanoj rakontados al siaj infanoj dum generacioj por ilustrati la homan kapablon por venki ian sorton. Tiuj viroj vivis dum 34 tagoj sur la senŝirma maro en kaŭĉuka savfluso, ok futojn longa kaj kvar futojn larĝa, tute sen ia nutraĵo krom tia kian ili elprenis el la maro kaj la aero per unu poŝ-tranĉilo kaj unu pistolo. Tamen ili travivis tion kaj alvenis fine al la marbordo de insulo kiun ili ne konis. Malgraŭ la suferado kaj malforteco, ili staris kiel kuraĝuloj, sen ia armilo restanta por defendi sin, kaj sen ŝuoj je la piedoj aŭ vestaĵoj je la dorsoj, kaj marŝis en milita vico ĉar, ili diris, "se tie estus Japanoj ni ne volis esti rampantaj."

La batalantaj viroj de Usono, kaj ĉiuj el la batalantaj viroj de la Unuiĝo de Nacioj, necesos elvoki la tuton de sia kuraĝo dum la sekvontaj kelkaj monatoj. Mi estas konvinkita ke la somero kaj aŭtuno de 1942 estos tempo de superega krizo por ni ĉiuj. Hitler, kiel la boksisto kiu konscias ke li alproksimiĝas al la falbatego, kolektas la tuton de sia restanta mili-

tistaro por doni unu lastan riskegan baton. Estas ekstrema timo en la koro de la frenezulo kaj kreskanta mal-kontento inter lia popolo, dum li pretiĝas por sia lasta tutpena ofensivo.

Ni devas anticipi ke la ofensivo kontraŭ nin atingos sian kulminon iam dum la sekvontaj kelkaj monatoj. La konvulsiaj penoj de la mortanta frenezulo estos tiel grandaj ke iuj eble estos trompitaĵoj al opinioj ke la situacio estas malbona je tempo kiam ĝi efektive pliboniĝas. Sed rilate al la plejmulto de ni, la okazoj en la sekvontaj kelkaj monatoj, kvankam ili eble estos maltrankviligaj, nur pliigos nian volon por okazigi plenan venkon en tiu ĉi milito por liberigo. Dum ni hardigas nin por la superega peno, ni ne devas forgesi la noblan heroismon de la subpremitaj en Eŭropo kaj Azio, ĉu ĝi estas en la montoj de Jugoslavio, la fabrikejoj de Ĉekoslovakio kaj Franclando, la bienoj de Pollando, Danlando, Nederlando kaj Belgujo, inter la maristoj de Norvegujo, aŭ en la milit-okupitaj

partoj de Ĉinujo kaj la Orientaj Indioj de Nederlando. Ĉie la animo de la homo sciigas la tiranon ke sklaveco de la korpo ne ĉesigas rezistadon.

Ne povas esti duonaj rimedoj. La volo de la usona popolo celas al plena venko. Nenia kompromiso kun Satano estas ebla. Ni ne haltos ĝis ĉiuj viktimoj sub la Nazi-jugo estas liberigitaj. Ni batalos por plena paco kiel ankaŭ por plena venko.

La popola revolucio estas en marŝo, kaj la diablo kaj ĉiuj liaj anĝeloj ne povos sukcesi kontraŭ ĝin. Ili ne povos sukcesi, ĉar la Eternulo subtenas la popolon.

*"Li donas povon al la malfortaj; al tiuj kiuj ne havas potencon Li pliigas fortikecon . . . Tiuj kiuj servas la Eternulon supreniros per flugiloj kiel agloj; ili kuros, sed ne laciĝos; ili marŝos, sed ne malfortiĝos."*

Forta per la potenco de la Eternulo, ni kiuj batalas por la popola afero neniam ĉesos ĝis tiu afero estas venkinta.

(Fino)

## KANADO KAJ MEKSIKO — VIVU, KRESKU, FLORU!

**KANADO:** Tiu granda Amerika lando, norde de Usono, multe revigliĝis lastatempe por la komuna klopotado pri Esperanto. Jam delonge tiu nelacigebla samideanino, F-ino Doris Saville, Vancouver, laboris por nia afero. Kaj ŝi skribas pri alia nelacigebla propagandisto en Kanado, Robert Karlson: "Vere, nia Vic-Prezidanto (nun Prezidanto de EANA), S-ro Karlson estas forta turo inter ni." Mankas spaco ĉi-foje por priskribi multajn aliajn. Jen, preskaŭ tuta klubo en Vancouver ĵus aliĝis al EANA, raportita de F-ino M. A. Lavoie: F-ino Saville, F-ino Bruce, S-ro Forrest, S-ro Hundal, F-ino Hassard, F-ino Lavoie.

**MEKSIKO:** De la Meksika Esperantistaro ofte venas leteroj pri la klopotoj por Esperanto, kaj kelkfoje ni havis la plezuron presi artikolojn en "AE." Sed ĝoje ni, en Nov-Jorko, havas intiman kontakton kun fervora subtenanto de Esperanto, en la persono de S-ro Macedonio Platas. S-ro Platas estis Prezidanto de "Centro Mexicano de Nueva-York," sed dum la milito li deĵoris en la Meksika Ambasadorejo en Vaŝingtono. Nun, li denove troviĝas en Nov-Jorko. Je la 19-a de Januaro, S-ro Platas faris paroladon kun belaj kolor-filmoj pri lia patrolando, ĉe la Esperanto-Interlingvo-Asocio, en la Hotelo Nov-Jorkano.

*Kanadanoj kaj Meksikanoj: Sendu plenan novaĵon por la sekvonta n-ro. de AE.*

# MIAJ AVENTUROJ EN LA MILITO

TEO JUNG, *Scheveningen, Nederlando*

La artikolo estas kompilita el partoj de leteroj, kiujn S-ro Teo Jung, fondinto de la semajna ĵurnalo *Heroldo de Esperanto*, sendis al D-ro W. Solzbacher kaj S-ro G. A. Connor.

Via Kristnaskokarto atingis min hodiaŭ, la 21-an de Decembro, je mia naskiĝtago. 53-jara mi fariĝis hodiaŭ. Jam! Kiam mi venis al Nederlando, mi estis ankoraŭ 43-jara. Kiel la tempo pasas! Kaj verdire ĉiuj ĉi estis jaroj perditaj.

Dum la milito mian filon oni volis ankaŭ kapti por la Hitler-Junularo, sed mi sukcesis forteni lin el la ungoj de la Nazioj. Kaj min oni volis en la lasta fazo de la milito ankoraŭ fari soldato. Sed mi strikis, "subakviĝis," la 21-an de Februaro 1945, kaj revenis hejmen nur je la 5-a de Majo, Tago de Liberiĝo. Tiam mi elpendigis la 5 metrojn longan verdan flagon, kiu laste estis flirtinta en Kolonjo antaŭ 12 jaroj — kiel signon, ke ankaŭ mi sentis min kaj la Esperanto-movadon fine liberigita de jugo, kiu premis nin dum 12 jaroj.

Mi bone memoras, kiam alvenis en Hago la unuaj amerikaj bombaviadiloj kun nutraĵoj anstataŭ bomboj. Tiam mi estis en hospitalo, kien mi estis rifuĝinta por eviti militservon por la Nazioj. Mi estis operaciita je simpla hernio, laŭdire tamen malsimpla, kaj la nederlanda kirurgo ĉiam denove malfermis mian vundon, kaj tiamaniere mi restis en la hospitalo dum 3 monatoj. La tago, kiam la aviadiloj alvenis, estis la plej bela tago en mia vivo. La bombaviadiloj, alitempe tiom ege timigaj, aperis al ni kiel savangeloj. Tute malalte ili flugis trans la urbon. La fratulinoj de la hospitalo staris en siaj monakinaj roboj sur la tegmento kaj salutis la aviadilojn per svingado de grandaj litorukoj. La malsanuloj vigliĝis. En la sama ĉambro, en kiu kuŝis mi, estis

du aliaj pacientoj. Unu el ili estis junulo kun inflamiĝinta genuo. Li apenaŭ kapablis sin turni en la lito. Tiu junulo ne plu sentis doloron; li saltis en la lito, kuris al la fenestro kaj entuziasme ekkriis: "Ha, belege! Grandioze! Potence! Ke tion mi povis ĝisvivi! Belege!" Jes, tiam ni ĉiuj jam sentis, ke la liberiĝo baldaŭ venos.

Nun ni denove vivas en paco. Sed la sekvo de la milito ankoraŭ ne estas venkitaj . . . Ĉie ankoraŭ estas ruinoj. Ankaŭ Hago multe suferis. Preskaŭ 8,000 loĝejoj estas komplete detruitaj, kaj aliaj dekmiloj estas difektitaj. En Scheveningen, antaŭe alloga banloko, ankoraŭ troviĝas multe da bunkroj, kirasmuroj, tankbariloj ("drakodentoj") ktp. En la posttagmezo antaŭ Novjaro ankoraŭ eksplodis municia bunkro en la dunoj proksime de ni. Estis terura krakego, la domoj tremis, ĉie splitiĝis vitroj. Flavruĝa nubo el ruinaĵoj, ŝtonoj kaj sablo leviĝis kvaŭzaŭ el kratero kaj deŝarĝis sian enhavon super la stratoj de Scheveningen. Kie la bunkro staris, troviĝis post la eksplodo grandega funelo 20 metrojn profunda . . .

Mi tralegis la numeron de "*Amerika Esperantisto*" kun granda intereso. La artikoloj estas legindaj, kaj kelkaj staras sur laŭdinde alta nivelo. Ankaŭ la eksterajo de la gazeto estas plaĉa, kaj mi supozas, ke en sia nova formo AE tre taŭgas kiel propaganda organo . . .

Mi estas klopodanta, jam de pli ol duona jaro, reaperigi "Heroldon." Nun fine mi sukcesis aranĝi, ke post nelonge, verŝajne je la fino de Marto, povu aperi la unua postmilita numero de la "Heroldo".

## LA BELECO

Tradukis: DAVIDO JAGERMAN

Inter ĉiuj malbelaj vizaĝoj en la mondo, ni foje vidas vizaĝon faritan laŭ la Dia plano. Tiam io mirinda okazas al ni; la Blua Birdo kantas, la Ora Bono brilas, kaj dum kurioza momento ĉio ŝajnas sensenca escepte de nia impulso por sekvi tiun belan vizion, sekvi ĝin ĝis la hela Paradizo kiun ĝi promesas.

Platono certigas al ni, ke tia momento ne estas (kiel ni emas konsideri ĝin) nur malklara kaj trompa afero de la sentoj, sed ĝi estas Dia malkovro. Platono diras ke en bela vizaĝo ni vidas, kiel en spegulo, la Absolutan Belon. Platono asertas ke ĝi estas ja la Realo brilante al ni en la kaverno kie ni loĝas en ombroj kaj mallumo. Tial ni sekvu tiujn belajn viziojn, kaj iliaj brilantaj paŝosignoj kondukos nin supren ĝis la plej alta Ĉielo de la Saĝo.

Ankaŭ la poetoj kantas pri tiu glora doktrino de la Belo per pezaj notoj sur siaj oraj kordoj. Tia muziko suprenfloras tra la ĉielo tiel dolĉa, tiel stranga, ke eĉ la Anĝeloj ŝajne klinas sin de la steloj por aŭskulti.

Tamen, ho Platono, ho Poeto, ho Anĝeloj de la Ĉielo, kiam ni sekvas vin, en kiajn embarasojn vi ja kondukas nin!

### Friendly Tips for Students

1. The word *foje* is an adverb which indicates time in an indefinite sense, and it is translated as "once, once upon a time, at times." It indicates that an action took place at an indefinite time. For example, take the word *nokte* which means "at night." *Homoj dormas nokte.* (People sleep at — during — in the night.) Not specifying, but generalizing the time. *Mi ŝatas legi vespere.* (I like to read in the evening.) *Lunde* (on Mondays), etc.
2. Often in Esperanto the suffixes are used with verb endings. The word *emas* is composed of *em* which means "tendency," plus the verb ending *as*. Thus *emas* means "have a tendency to" (or "tend to"). In the story, *kiel ni emas konsideri ilin* is translated "as we tend to consider them." When using your dictionary you must remember the agglutinate (putting together) quality of Esperanto, and be guided by the meanings of each part of the Esperanto word.

— P. K.

---

STEPHENS WORD CARDS: 512 cards with pictures on one side, and words on the other, translations in French, Spanish, German, Italian, English, and ESPERANTO. Excellent game for learning Esperanto. Order from American Esperantist, only \$1 per set.

## “NI IRU!”

Since Mrs. Flora Wyman's call for \$100 contributions to the "Working Fund" we have received two responses. First to answer her challenge was S-ro James H. Furay, with the striking slogan, "Ni iru!", and a check for \$100. S-ro Furay's slogan is typically American, in both language and spirit. Immediately following his check, we received the second \$100 from "Anonymous". If just three more members will immediately act in the spirit of "Ni iru!", with contributions of \$100, we will win Mrs. Wyman's \$100, and we will have carried the "Working Fund" to immediate and complete success! A bit over half the sum required has now been contributed. Surely three more members will come for-

ward with \$100 each; and there must be several who will send in their \$25 contributions: Let's all dig deep, and put the FUND "over the top". "NI IRU!" May we list you among those, in next issue of "AE", who have contributed to this all-important campaign for *Esperanto in America!*

We are happy to also announce a new member of our Advisory Committee, by virtue of his contribution of \$25: George B. Wrenn. Other contributions to date are: George Hirsh, \$6; W. G. Adams, \$5; Conrad Fisher, \$5; Clement Ayres, \$3; Grace Randolph, \$2; Eldred Lowe, David Jagerman, Edward D. Moore, Julia May Leach, \$1 each. Thank you one and all! May we hear from many others!

### Contributions to EANA Exempt from Federal Income Tax

Here are the more important paragraphs of the Treasury Department's document re Exemption, to EANA, October 17, 1945: "... you are exempt from Federal income tax under the provisions of section 101(6) of the Internal Revenue Code and corresponding provisions of prior revenue acts, as it is shown that you are organized and operated exclusively for educational purposes."

"Contributions made to you are deductible by the donors in arriving at their taxable net income in the manner and to the extent provided by section 23(o) and (q) of the Internal Revenue Code, as amended, and cor-

responding provisions of prior revenue acts."

"Bequests, legacies, devises or transfers, to or for your use are deductible in arriving at the value of the net estate of a decedent for estate tax purposes in the manner and to the extent provided by sections 812(d) and 861(a)(3) of the Code and/or corresponding provisions of prior revenue acts. Gifts of property to you are deductible in computing net gifts for gift tax purposes in the manner and to the extent provided in section 1004(a)(2)(B) and 1004(b)(2) and (3) of the Code and/or corresponding provisions of prior revenue acts."

---

### Anonco de la Administra Komitato

**KOMITATOJ DE EANA:** La Statuto de EANA nomas kvar Konstantajn Komitatojn, kiujn la Administra Komitato de EANA estigas post sia elekto. Laŭ la Statuto, la Administra Komitato nomis la jenajn kiel Estrojn de la diversaj Komitatoj: *Financa Komitato*, Viktoro Murajo; *Propaganda Komitato* (provizore ĉe la Centra Komitato); *Eldona Komitato* (la Centra Oficejo); *Ekzamena Komitato*, Profesoro Edwin L. Clarke (kiu daŭrigas sian servon).

## ESPERANTO-KRONIKO

*Radio dissendo en Belo Horizonte, Brazilo* okazas ĉiusabate sur mallonga ondo je 49.75 metroj. La programo estas "Brazilo Kroniko," kaj ĝi celas propagandi Brazilan vivon eksterlande. La stacio bonvenigos leterojn pri viaj preferoj kaj sugestoj. Skribu al la *Direktoro* por lin danki pri la enkonduko de Esperanto. Adreso: *Brazilo Kroniko, Radio Inconfidencia, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.*

*Armin F. Doneis*, Pharr, Texas, denove komencas kursojn laŭ la Cseh-metodo, kiun li bone konas kaj jam aplikis en antaŭaj jaroj. Inter diversaj servoj por Esperanto, S-ro Doneis fervore laboris kiel Estro de la Financa kaj Membrara Komitatoj dum la militaj jaroj. Tiuj komitatoj nun funkcias pli proksime al la Centra Oficejo. EANA multe dankas S-ron Doneis pro la diligentaj militjaraj servoj.

*Bela ilustrita broŝuro* en Esperanto pri la urbo Bruĝo, Belgujo, estas havebla senpage de la urba-administracio. Skribu al *Oficiala Servo por Turismo, Halle, Markt, Brugge, Belgium.*

★

### Esperanto Kreskas

*New Esperanto Classes: Washington, D.C.*, class at 1416 Allison St., N.W., taught by Ernest G. Dodge; *Portsmouth, N.H.*, class in the YWCA, Monday evenings, taught by Roan Orloff, Cseh - Conversational - Method; *Steep Falls, Maine*, Tom Robbins, teacher; *Palo Alto, Calif.*, Monday evenings in First Christian Church, teacher, Herbert L. Thompson; *Moncton, N.B., Canada*, class of Rover Scouts taught by Rev. J. H. Freestone in Wesley Memorial Church; *Dearborn, Mich.*, in the home of Mrs. Lawrence Thomas, taught by Joseph Murray; *Castleton, Vt.*, class being organized by Dr. Frank M. Gracey, at the State Normal School.

*Natur-Amikoj de Ameriko* komencas lerni Esperanton. Jam aperis du artikoloj en la *jurnalo* de la societo pri la lingvo kaj la movado, kaj pri la personaj spertoj de la aŭtoro, Karl Nell, en Esperantujo.

*Redaktisto de la gazeto "This Month,"* Ada Siegel paroladis ĉe la Februara kunveno de la Esperanto-Societo de Nov-Jorko. Ŝi bele klarigis la celojn de la "Association for the Promotion of International Understanding," kiun ŝi estras. Ŝi komentis ankaŭ pri la utileco de Esperanto tiucele.

*Mortis subite*, la 2-an de Januaro, pro kormalsano, pionira Esperantisto, *Anthony F. Korrek* de Detroit, je aĝo de 71 jaroj. Sinceran kondolencon al lia familio.

*Pastro H. E. Mueller* de la ŝtato, Minesoto, bona Esperantisto jam de multaj jaroj estas nun Estro de la Sud-Okcidenta Distrikto kaj Direktoro de Kristana Eduko de la Minesota Evangelika Eklezio.

"*Eksterlanda korespondado nur Esperante aŭ Germane*" estis la anonco sur la leter-papero de samideano Hugo Gerisch kiam li estris grandan fabrikeyon en Germanujo antaŭ la milito. Li nun troviĝas en Kanado, daŭre lojala al Esperanto.

"*'Robbins Brute-Force Propaganda System'* estas tre simpla." Tiel diris Tom Robbins de Steep Falls, Maine. "Mi elektas amikon, kiu ŝatas ricevi leterojn de mi, ekzemple mia frato. Mi skribas al li: 'Sorry to do this, George, but this letter is in Esperanto. Am enclosing a Key which will enable you to dope out the mess after a while. Have a lot of fun . . .' La alia parto de la letero estis en la interlingvo. Kaj lia responda letero montris ke li, kaj mi, bone sukcesis!"



## ESPERANTO-KRONIKO

*Esperanto-Societo de la 'Bay'-Distrikto* nun regule kunvenas ĉe la hejmo de F-ino Helene Wolff-Kleve en San-Francisko. Je la pasinta kunveno ili havis du eksterubajn vizitantojn: Raymond Fuggit kaj Martin Winant. San-Francisko intencas starigi kurson por lernantoj.

*Kenneth A. Anderson* ĵus revenis de Japanujo kie li deĵoris je milit-servo. Li denove loĝas ĉe Casper, Wyoming. Bonvenon hejme!

*Studento de Esperanto dum malpli ol kvar semajnoj*, Fred L. Broening tamen skribis tre bonan Esperantoleteron al AE. Li skribis: "Artikolo de S-ro Charles Chomette de Los Angeles, kiun mi legis antaŭ mallonge, vekigis mian intereson de tiu-ĉi lingvo. Mi trovis lernolibron en biblioteko kaj ekstudis. Tiam mi skribis al S-ro Chomette en Esperanto." Kaj nun li estas ano de EANA!

*Glenn P. Turner* de Madison, Wisconsin, daŭre laboras por nia afero. Leteroj de li estis presitaj diversfoje en la ĵurnaloj de Madison. Baldaŭ li komencos novan gravan agadon kune kun la Centra Oficejo. Atendu la novaĵon!

*Vigla Agado por Esperanto en Detroit* montriĝas en la laboro de S-ino Mabelle Davis kaj la Esperanto-Societo de Detroit. S-ino Davis gvidas Esperanto-kurson en Grosse Point ĉiumerkrede, kaj David Earl instruas kurson ĉe Northern High School, ĉiu sub la aŭspico de la Urba Eduka Administracio. Ĉe publika kunveno, organizita de Ges-roj Davis, Dr. F. S. Onderdonk paroladis pri Esperanto, Januaro la 17-an, kaj Sinjoroj Murray kaj Sievers aranĝis ekspozicion de Esperantaĵoj. En Zamenhof-Vespero de la Societo oni kolektis 50 dolarojn por sendi nutraĵojn al la familio Zamenhof.

*Du novaj Patronoj de EANA estas* Hans B. Julow, South Hadley, Mass., kaj Edwin Sievers, Detroit, Mich. Kiu sekvos ilian bonan ekzemplon por plifortigi nian asocion EANA?

*La Esperanto-Klubo de Los Angeles* raportas sukcesajn kunvenojn. Inter la ĉefaj parolantoj estis S-ro P. P. Christensen, la nova Prezidanto; la Vic-Prezidantoj, Scherer kaj Chomette. La du knabinoj Dianto kaj Lilio Chomette pruvigis al la gastoj kiel bele sonas Esperanto el infana buŝo. S-ro Scherer parolis pri la interesa enhavo de AE, kaj jam 12 novaj samideanoj pagis la kotizon por EANA. C. E. Peterson de la sama Klubo jam varbis 5 novajn abonantojn por AE en 1946. Laŭdinda kaj imitinda laboro!

*Eĉ kiam en hospitalo* samideano F. A. Post propagandas Esperanton. Venis al ni bela afiŝo de la Armea Hospitalo por Veteranoj en Hot Springs, Arkansas, anoncanta paroladon de S-ro Post pri "Esperanto en Mond-Vojaĝoj." Ĉeestis la kunvenon 100 pacientoj!

*La nova Usona Militŝipo*, la "Franklin Delano Roosevelt," la dua plej granda ŝipo en la mondo, ankaŭ havas Esperantiston sur ĝi. Li estas Bill Harmon, juna samideano de Kalifornio, kiu intencas gvidi Esperanto-kurson surŝipe.

*"Afrika Voĉo,"* redaktata de S-ro J. Semmelink, 7a aleo 318, Capital Park, Pretoria, Sud-Afriko, organizas literaturan konkurson pri la temo "Neforgesebla Tago de Miaj Mondmilitaj Jaroj Ekde 1939." La verketo devas esti 800-2,000-vorta. Ĝi povas esti ĝoja aŭ malĝoja, el milita aŭ familia aŭ socia vivo. Sendaĵoj devas enhavi neuzitajn poŝtmarkojn je valoro de afranko por du eksterlandaj leteroj. Ferma dato: la 30-a de Junio 1946. 3 premioj: 2, 1, 1/2 anglaj pundoj.

*Bulgarujo.* S-ro Todor Jelen, Str. Mitmolu 23, Kazanlak. Bankisto, 30-jara, kolektas PM, dez. kor. pri ĉiuj temoj.

*Bulgarujo.* F-ino Rašel Mešulam, Str. Mutkurova N. 91, Russe. 20-jara kudristino, dez. kor. kun ĉiuj amerikanoj.

*Nederlando.* S-ro H. S. Goudsmid, Regentesselaan 20, Ryswyk. 20-jara holanda judo, postrestas sola de tuta familio, dez. kor.

*Portugalujo.* S-ro Alberto Pedro da Silva, Quinta do Ferra, Rua B. no. 28, Lisboa. Dez. kor. kun Kanadanoj kaj Usonanoj.

*Francujo.* S-ro A. Frangeul, 11 Rue des Deux-Haies, Angers, Maine-et-Loire. Dez. kor. pri sociaj kaj sindikataj movadoj.

*Francujo.* F-ino Simone Brun, Perception, Saint Sernin s/ Rance, Aveyron, 21-jara, dez. kor.

*Belgujo.* S-ro Carlos Braet, Esscheboomstraat 1, Brugge. Instruisto, dez. kor., afranku filatele.

*Danujo.* Holbaek Esperanto-Klubo, Ringstedveg 17, Holbaek. En Marto, 1946, ni aranĝos letervesperon. Skribu amase. Garantias respondon.

*Hungarujo.* S-ro Lazlo Spierer, Kiraly-u. 90, Budapest VI. Malnova Espisto, tradukisto de Esp-aj verkoj, dez. kor. kun spertaj Esperantistoj en Usono.

*Ĉekoslovakio.* S-ro Jaromir Peknice, Ondrickova 20, Praha XII. Filatelisto, dez. interŝ. PM tutmonde.

*Hispanujo.* Octavio de Diego de la Rosa, 12 Baltaser Gracian St., Zaragoza. Li kaj 3 fratoj, Oscar, Fernando, kaj Antonio, aĝoj 19, 22, 26, kaj 28, dez. kor. kun Usono.

*Italujo.* S-ro Lozzi Bruno, Montelupo-Florentino. Dez. kor. nur pri PM kun ĉiuj landoj.

*Belgujo.* S-ro Andre Caleys, Laue 29, Brugge. Dez. kor. pri literaturo kaj teorio de Einstein.

*Turkujo.* S-ro Asim Koprulu, Posta Kutusa 6, Aydin. Dez. interŝ. PM.

*Svedujo.* S-ro Sven Alexandersson, Jakobsbergsgat 20-B, Västerås. Civila inĝeniero, laboras ĉe Teknika Nomenklaturu-Centro, dez. kor. pri teknikaj terminarioj, ktp.

*Grekujo.* S-ro Gregory Papakonstantinou, Direktoro de Poŝt-Telegrafa Oficejo, Eressos, Mitylene Insulo. Dez. trovi komercistojn por interŝ. PM.

*Nederlando.* S-ro L. Weijts, Fabianusstraat 45, Apeldoorn. Dez. kor. kun ĉiuj landaj, precipe kun katolikoj kaj instruistoj.

*Portugalujo.* F-ino Ercilia A. Simplicio, Tramagal. Dez. kor. letere aŭ PK tutmonde.

*Francujo.* S-ro Germain Stephan, 15 Boulevard d'Harfleur, Le Havre (Seine-Inf.). Dez. kor. kun usonaj soldatoj aŭ maristoj kiuj pasas tra Le Havre, ricevos ilin hejme.

*Nederlando.* S-ro A. M. J. van der Schans, v. voorst tot Voorstraat 8, Vught. 17-jara, dez. kor. kun amerikanoj samagaĵ.

*Svedujo.* S-ro Sven E-son Sten, Box 1, Uppsala. Dez. kor. kun amerikanoj en ĉiuj Usonaj ŝtatoj, interŝ. PM, fotojn, librojn, gazetojn.

*Usono.* S-ro Arthur Bedford, 50 Central Ave., Hillsdale, N. J. Dez. kor. kaj interŝ. PM kun kolektantoj, amatore aŭ profesie kaj pogrande.

*Brazilo.* C. S. Cunha, Alagoinhas, Bahia. Dez. kor. pri dom-konstruado, interŝ. PM laŭ manklisroj.

*Brazilo.* Prof. -ino Margarida Leal, Str. Areal de Cima 19, Urbo Salvador, Bahia. Dez. kor. pri moroj kaj edukadoj, sed nur per PK.

*Argentino.* Arta Rondo-Esperanto, Victoria 724-P. 1°, Buenos Aires. 60 lernantoj de la Esperanto-kurso dez. kor. pri kulturaj temoj.

*Ĉinujo.* S-ro Laŭluo, c/o Ĉengtua Esperanto-Ligo, P.O. Box 77, Chengtu. 22-jara junulo dez. kor.

## ESPERANTO BOOKS

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. 64 pp. (war-time edition) .....	.25c
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Dr. Ivy Kellerman-Reed. More complete beginner's text. 142 pp. (war-time edition) .....	.75c
STEP BY STEP IN ESPERANTO, M. C. Butler. Excellent simple text with instruction and numerous exercises. 244 pp. .... Paper, .80c; Cloth,	\$1.25
PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. S. Benson. Unique picture-method with 650 illustrations, English text, and Vocabulary. 80 pp. ....	.25c
UNIVERSALA ESPERANTO-METODO, Dr. Wm. S. Benson. "The only book of its kind in the world". 11,000 pictures. Pronunciation of Esperanto alphabet and tables of correlatives in 36 languages. Direct picture-method of instruction and definition. Complete textbook, reader, dictionary (fully illustrated with common words given in 40 languages), and index. A unique and encyclopedic book. 560 pp. .... cloth bound, stamped in gold	\$4.00
ESPERANTO, G. Alan Connor & Doris T. Connor. (World Language Series, edited by Prof. Mario A. Pei). A practical introduction to Esperanto, and systematic phrase-book. 32 pp. ....	.65c
LANGUAGES FOR WAR AND PEACE, Mario A. Pei, Ph.D. Guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> (see above). 663 pp. .... cloth	\$5.00
ESPERANTO KEY (English). Esperanto in miniature. .. .10c; 3 for .20c; 10 for .50c	
10-in-1 DICTIONARY OF BASIC LANGUAGE, French, German, Spanish, Italian, Russian, Chinese, Japanese, Arabic, Portuguese, Esperanto, 10 languages, including Esperanto, in a nutshell. 110 pp. .... Paper .50c; Cloth	\$1.50
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Carl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. 80 pp. (war-time edition) .....	.30c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. 1942 edition. 490 pp. Cloth	\$3.50
KARLO, Edmond Privat. Easy first-reader in Esperanto. 44 pp. ....	.30c
ESPERANTISMO, I. Gomes Braga. Miscellaneous articles about Esperanto movement, in easy excellent Esperanto. Recommended for individual, class, or club reading practice. 32 pp. .... .15c, 10 for	\$1.00
ESPERANTO-SORTIMENTO: <i>Ginevra</i> , Privat; <i>Princo Vanc'</i> , Putnam-Bates; <i>Blanche</i> , Payson; <i>Miserere kaj Thais</i> , Payson; <i>La Rozujo Ĉiumiljara</i> , Payson; <i>La Akrobato de Nia Sinjorino</i> , Payson. Good Esperanto reading at bargain prices to reduce stocks .....	.25c each; all 6 for \$1.00
SEP VANGOFRAPOJ, Karlo Aszlanyi. Most recent novel of the "Epoko Series". Translated from the Hungarian. 145 pp. ....	.75c
LA SANKTA BIBLIO en Esperanto. Complete old and new testaments, translated from original languages by Zamenhof and Committee of British scholars. Beautifully printed on best bible paper, bound in cloth and stamped in gold. Best example, and value, in Esperanto books. Every Esperantist should have a copy. 996 pp. ....	\$2.00
JUNECO KAJ AMO (Legendo el Venecio), Edw. S. Payson. .... Cloth	.50c
THE LANGUAGE PROBLEM, Its History and Solution, E. D. Durrant. Highly recommended, complete treatise, with index. 168 pp. .... Cloth	\$1.50
"LA ESPERO" & "LA VOJO." Two separate Esperanto songs, with words and music for piano .....	.25c
INDIAN BEAD STARS. White background with green star in center .....	.45c

### YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist," \$2.00 per year. Sustaining Member, annually, \$5.00. Patron Member, annually, \$10.00. Life Member, one payment, \$100.00. All memberships include "American Esperantist." Your membership in one of the higher brackets will greatly aid in the promotion of Esperanto in North America. Send your membership dues to:

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA  
114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

On the island of Saipan, in the Pacific, two of the Naval Air Base personnel are studying Esperanto. They are Ilow C. Limb and Wiley O. May. Like the Philippine guerrilla on Leyte, whose letter we printed in "AE", they view Esperanto as the living interlanguage created for interchange of thought between peoples of different national languages — not to take the place of their mother tongues.

Ilow C. Limb and Wiley O. May are convinced of the need for active support to the Esperanto movement. Their example, as shown in a recent letter to the Editor, is an inspiration to all men in the cause of world unity and understanding. They write:

"We wish to take this opportunity to express our pleasure for the prompt reply to our request for information on Esperanto. We were convinced after reading the pamphlets that Esperanto was truly a medium that would tend to lessen international differences, as it expands. And it will — because the need for a common means of interchange of ideas and expression will be the shoulder that will push the gates of language difficulties wide open!"

"We were convinced that this expansion of Esperanto would be inevitable. So we sent for textbooks immediately, expecting a delay of several months in receiving them, since we are stationed on Saipan. But they arrived in less than a month, and the language has proved much simpler and full of beauty than we had hoped for."

"But being of a practical mind also, we realize the need for funds to promote Esperanto. So we are sending money-order for dues as Sustaining Members (\$5 each). Yours for continued success, Ilow C. Limb and Wiley O. May. (Saipan)."